

Im Nachfolgenden dokumentieren wir die Bulonja Deklaracio (Auszug) und das Antaŭparolo gemäß der Ausgabe von 1905 zusammen mit unserer deutschen Übersetzung. Wir haben uns bewusst eng an die originale Sprache der Epoche mit ihrer komplexen Satzstruktur gehalten. Die in eckigen Klammern eingefügte Nummerierung der Absätze und (Teil-) Sätze ist nicht amtlich und dient lediglich der leichteren Zitierfähigkeit. Gleiches gilt für die Zwischenüberschriften in eckigen Klammern, die allein der schnelleren Orientierung dienen.

### **Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo (eltiraĵo)**

*[Alineo 4: La Fundamento kiel ĝenerala interkonsento]*

*4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo [BD 4.1]. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan [BD 4.2]. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon [BD 4.3]. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj « tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto » [BD 4.4]. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo [BD 4.5]. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton [BD 4.6].*

### **Erklärung über das Wesen des Esperantismus (Auszug)**

#### **[Absatz 4: Das Fundament als allgemeine Übereinkunft]**

4. Esperanto hat keinen persönlichen Gesetzgeber und hängt nicht von einem bestimmten Menschen ab [BD 4.1]. Alle Meinungen und Werke des Schöpfers des Esperanto haben, ähnlich wie die Meinungen und Werke jedes anderen Esperantisten, rein privaten und für niemanden zwingenden Charakter [BD 4.2]. Die einzige einmal für immer für alle Esperantisten verpflichtende Grundlage der Sprache Esperanto ist das Werkchen „Fundamento de Esperanto“, an dem niemand das Recht hat eine Änderung vorzunehmen [BD 4.3]. Weicht jemand von den Regeln und Modellen in dem genannten Werk ab, kann er sich niemals mit den Worten rechtfertigen – so wünscht oder empfiehlt es der Autor des Esperanto“ [BD 4.4]. Jede Idee, die nicht zweckmässig mit dem Material ausgedrückt werden kann, das sich im „Fundamento de Esperanto“ befindet, darf jeder Esperantist rechtmässig auf die Weise ausdrücken, die er am richtigsten findet, gerade so wie es in jeder anderen Sprache gemacht wird [BD 4.5]. Aber im Hinblick auf die vollständige Einheit der Sprache ist allen Esperantisten empfohlen soweit wie möglich den Stil zu imitieren, der sich in den Werken des Schöpfers des Esperanto findet, der am meisten für und in Esperanto gearbeitet hat und am besten seinen Geist kennt [BD 4.6].

## Antaŭparolo

*[Alineo 1: Defioj kaj rimedo – netuŝebla interkonsento]*

*[1] Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, - estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo [A 1.1]. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4] Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5].*

## Vorwort

**[Absatz 1: Herausforderungen und Lösung – unantastbare Vereinbarung]**

[1] Damit eine internationale Sprache sich gut und regelhaft entwickeln kann und damit sie volle Sicherheit hat, dass sie niemals zerfallen wird und ein leichtsinniger Schritt ihrer künftigen Freunde nicht die Arbeiten ihrer früheren Freunde zerstört, – ist am allernotwendigsten vor allem eine Bedingung: Das Bestehen eines klar definierten, niemals antastbaren und niemals veränderbaren Fundaments der Sprache [A 1.1]. Wenn unsere Sprache offiziell von den Regierungen der wichtigsten Reiche anerkannt worden sein wird und diese Regierungen durch ein spezielles Gesetz dem Esperanto ein ganz sicheres Leben und Gebrauch und volle Gefährlosigkeit vor allen persönlichen Marotten oder Disputen garantieren werden, dann wird ein mit Autorität versehenes Komitee, das einvernehmlich von diesen Regierungen gewählt wurde, das Recht haben, in den Grundlagen der Sprache einmal für immer alle gewünschten Änderungen vorzunehmen, falls diese Änderungen sich als notwendig erweisen werden [A 1.2]; aber bis zu diesem Zeitpunkt müssen die Grundlagen des Esperanto in strengster Weise absolut unverändert bleiben, denn strenge Unantastbarkeit unserer Grundlagen ist der wichtigste Grund unseres bisherigen Fortschritts und die wichtigste Bedingung für unseren geregelten und friedlichen künftigen Fortschritt [A 1.3]. Keine Person und keine Sozietät darf das Recht haben, willkürlich in unseren Grundlagen auch nur die kleinste Änderung vorzunehmen! Dieses äußerst wichtige Prinzip mögen die Esperantisten stets gut erinnern und gegen die Verletzung dieses Prinzips mögen sie immer mit aller Kraft kämpfen, denn der Moment, in dem wir dieses Prinzip verletzen, wäre der Anfang unseres Todes [A 1.5].

### **[Alineo 2: De silenta al eksplicita komuna interkonsento]**

[2] *Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro » [A 2.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3].*

### **[Absatz 2: Vor der stillschweigenden zur ausdrücklichen gemeinsamen Vereinbarung]**

[2] *Gemäß stillschweigender Übereinkunft aller Esperantisten werden schon seit sehr langer Zeit die folgenden drei Werke als Grundlagen des Esperanto angesehen: 1.) Die Grammatik mit den 16 Regeln; 2) das „Universala Vortaro“; 3) das „Ekzercaro“ [A 2.1]. Diese drei Werke hat der Autor des Esperanto stets als Gesetze für sich angesehen und trotz häufiger Versuchungen und Verlockungen hat er sich niemals selbst nur den kleinsten Verstoß gegen diese Gesetze (zumindest bewusst) erlaubt [A 2.1]; er hofft, dass zum Guten unserer Angelegenheit auch alle anderen Esperantisten diese drei Werke stets als einzige gesetzliche und unantastbare Grundlage des Esperanto ansehen [A 2.3].*

### **[Alineo 3: „Oficiala“ (deviga) kontraŭ „privata“ (nur rekomendita)]**

[3] *Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnanto sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]. Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro [A 3.3]. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidus alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6].*

### **[Absatz 3: „Amtlich“ (verbindlich) versus „privat“ (nur empfohlen)]**

[3] *Damit ein Reich stark und ruhmvoll ist und damit es sich gesund entwickeln kann, ist erforderlich, dass jeder Staatsangehörige weiß, dass er niemals von den Launen dieser oder jener Person abhängt, sondern stets nur klare, vollständig definierte grundlegende Gesetze seines Landes gehorchen muss, die in gleicher Weise bindend für die Herrschenden und Beherrschten sind und in denen niemand das Recht hat, willkürlich nach persönlichem Gutdünken eine*

Änderung oder eine Ergänzung zu machen [A 3.1]. Genauso ist es, damit unsere Angelegenheit gut voranschreite, erforderlich, dass jeder Esperantist die volle Sicherheit hat, dass Gesetzgeber für ihn stets nicht irgendeine Person, sondern ein klar definiertes Werk sein wird [A 3.2]. Daher hat der Autor des Esperanto, um allen Missverständnissen und Disputen ein Ende zu bereiten und damit jeder Esperantist ganz klar wisse, woran er sich in Allem zu halten habe, beschlossen, nunmehr in Form eines Buches diese drei Werke herauszugeben, die gemäß stillschweigender Übereinkunft aller Esperantisten schon seit langem die Grundlagen des Esperanto geworden sind, und er bittet, dass die Augen aller Esperantisten stets nicht auf ihn gerichtet seien, sondern auf dieses Buch [A 3.3]. Bis zu dem Zeitpunkt, zu dem irgendeine mit Autorität versehene und unbestreitbare Institution anders entscheiden wird, muss alles, was sich in diesem Buch befindet, als verbindlich für alle angesehen werden; alles, was gegen dieses Buch ist, muss als schlecht angesehen werden, sogar wenn es aus der Feder des Autors des Esperanto selbst stammte [A 3.4]. Nur die oben genannten drei Werke, veröffentlicht in dem Buch „Fundamento de Esperanto“ müssen als amtlich angesehen werden [A 3.5]; alles andere, das ich verfasst habe oder verfassen werde, das ich empfehle, korrigiere, gutheiße usw., sind nur private Werke, die die Esperantisten – falls sie dies für die Einheit unserer Angelegenheit für nützlich erachten – als modellgebend, aber nicht als verbindlich ansehen können [A 3.6].

#### **[Alineo 4: Interpretado per kunteksta komparo]**

*[4] Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7].*

#### **[Absatz 4: Auslegung durch Vergleich im Kontext]**

[4] Auf Grund ihres Grundlagencharakters müssen die drei in diesem Buch nachgedruckten Werke vor allem unantastbar sein [A 4.1]. Daher mögen die Leser sich nicht wundern, dass sie in der nationalen Übersetzung verschiedener Wörter in diesem Buch (besonders im englischen Teil) völlig unkorrigiert dieselben Fehler finden, die sich in der ersten Auflage des „Universala Vortaro“ finden [A 4.2]. Ich habe mir nur erlaubt die Druckfehler zu korrigieren; wenn jedoch irgendein Wort irrig oder ungeschickt übersetzt ist, habe ich es in diesem Buch völlig unverändert gelassen; denn wenn ich es verbessern wollte, wäre dies bereits eine Änderung, die zu Disputen führen könnte und die in einem Grundlagenwerk nicht toleriert werden kann [A 4.3].

Die Grundlagen müssen streng unantastbar bleiben, sogar zusammen mit ihren Fehlern [A 4.4]. Die Fehlerhaftigkeit in der nationalen Übersetzung dieses oder jenes Wortes stellt kein großes Unglück dar, denn, indem man den Kontext der Übersetzung in den anderen Sprachen vergleicht, findet man leicht den wahren Sinn jedes Wortes [A 4.5]; aber eine unvergleichlich größere Gefahr stellte die Änderung der Übersetzung irgendeines Wortes dar, denn, sobald es die strenge Unantastbarkeit verloren hat, verlöre das Werk seinen außerordentlich notwendigen Charakter dogmatischer Fundamentalität, und, indem er in einer Ausgabe eine andere Übersetzung als in der anderen findet, hätte der Nutzer nicht die Sicherheit, dass ich morgen nicht irgendeine andere Änderung machen werde, und er verlöre sein Vertrauen und seine Unterstützung [A 4.6]. Jedem, der mir irgendeinen nicht guten Ausdruck im Fundamento-Buch zeigt, werde ich ruhig antworten: ja, es ist ein Fehler, aber er muss unangetastet bleiben, denn er gehört zum Grundlagendokument, an dem niemand das Recht hat, irgendeine Änderung vorzunehmen [A 4.7].

### **[Alineo 5: Fundamento kiel gvida kontrol-dokumento]**

*[5] La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Ho, ne! [A 5.2] Kiu volas perfektigi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3]. Sed la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobatataj [A 5.4]. La « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5].*

### **[Absatz 5: Das „Fundamento“ als ständige Überprüfungshilfe]**

[5] Das „Fundamento de Esperanto“ darf in keiner Weise als bestes Lehr- und Wörterbuch des Esperanto angesehen werden [A 5.1]. Oh, nein! [A 5.2] Wer sich im Esperanto vervollkommenen will, dem empfehle ich die verschiedenen Lehr- und Wörterbücher, viele besser und umfangreicher, die von unseren kompetentesten Freunden getrennt für alle Nationen herausgegeben wurden und unter denen die wichtigsten sehr gut und sorgfältig herausgegeben wurden unter meiner persönlichen Kontrolle und mit meiner Mithilfe [A 5.3]. Aber das „Fundamento de Esperanto“ muss sich in den Händen jedes guten Esperantisten als ständiges Leitdokument befinden, damit er gut verinnerliche und durch häufiges Hineinschauen sich ständig in Erinnerung rufe, was in unserer Sprache amtlich und unantastbar ist, damit er stets gut die amtlichen Wörter und Regeln, die sich in allen Lehrwerken des Esperanto befinden müssen, von den privat empfohlenen Wörtern und Regeln, die vielleicht nicht allen Esperantisten bekannt sind oder vielleicht nicht von allen gebilligt werden, unterscheiden kann [A 5.4]. Das „Fundamento de Esperanto“ muss sich in den Händen jedes Esperantisten befinden als ständige Überprüfungshilfe, die ihn vor dem Abweichen vom Weg der Einheit bewahrt.

### **[Alineo 6: Evoluipovo malgraŭ netuŝebleco]**

*[6] Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos ... [A 6.2] Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektigiĝadi [A 6.3]; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4]. Pli detale mi parolos pri tio ĉi en la Bulonja kongreso [A 6.5]; nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]:*

### **[Absatz 6: Entwicklungsfähigkeit trotz Unantastbarkeit]**

[6] Ich habe gesagt, dass die Grundlagen unserer Sprache absolut unantastbar sein müssen, selbst wenn es uns scheinen sollte, dass dieser oder jener Punkt zweifellos fehlerhaft ist [A 6.1]. Dies könnte den Gedanken wecken, dass unsere Sprache für immer starr sein wird und sich niemals entwickeln wird ... [A 6.2] Oh, nein! Trotz der strengen Unantastbarkeit der Grundlagen, wird unsere Sprache die volle Möglichkeit haben nicht allein konstant reicher zu werden, sondern sich sogar konstant zu verbessern und zu vervollkommenen [A 6.3]; die Unantastbarkeit der Grundlagen wird uns nur konstant garantieren, dass diese Perfektionierung nicht durch willkürlichen, streiterischen und ruinösen Bruch und Änderung, nicht durch Annullierung und Entwertung unserer bisherigen Literatur, sondern auf natürlichem, unbeirrten und ungefährlichem Wege geschieht [A 6.4]. Detaillierter werde ich hierüber auf dem Kongress in Boulogne sprechen [A 6.5]; jetzt werde ich hierzu nur einige Worte sagen, damit meine Auffassung nicht allzu paradox erscheinen möge [A 6.6]:

### **[Alineo 7: „Novaj vortoj“]**

*[7] 1) Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la literaturo; sed en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la « Fundamento » ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1]. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento » [A 7.2].*

### **[Absatz 7: „Neue Wörter“]**

[7] 1) Bereichern kann man die Sprache bereits jetzt durch neue Wörter, im Wege der Beratung mit den Personen, die als diejenigen mit der größten Autorität in unserer Sprache angesehen werden und indem man dafür sorgt, dass alle diese Wörter in derselben Form benutzen; aber diese Wörter sind nur empfohlen, nicht angemetet; man sollte sie nur in der Literatur benutzen; aber im Briefwechsel mit unbekanntenen Personen ist es gut, stets danach zu streben nur Wörter aus dem „Fundamento“ zu benutzen, denn nur hinsichtlich dieser Wörter können wir sicher sein, dass unser Adressat sie jedenfalls in seinem Wörterbuch findet [A 7.1]. Nur irgendwann später,

wenn der größte Teil der neuen Wörter schon ganz reif sein wird, wird eine mit Autorität versehene Institution sie in das Amtliche Wörterbuch als „Zusatz zum Fundamento“ aufnehmen [A 7.2]

#### **[Alineo 8: „Formoj novaj“]**

*[8] 2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3].*

#### **[Absatz 8: „Neue Formen“]**

[8] 2) Wenn irgendeine zentrale, mit Autorität versehene Institution befinden wird, dass dieses oder jenes Wort oder diese oder jene Regel in unserer Sprache zu unopportun ist, darf sie die genannte Form nicht entfernen oder ändern, sondern sie kann eine neue Form vorschlagen, deren Gebrauch parallel zu der alten Form sie empfiehlt [A 8.1]. Mit der Zeit wird die neue Form nach und nach die alte Form verdrängen, die zum Archaismus wird, wie wir dies in jeder natürlichen Sprache sehen [A 8.2]. Aber, da sie einen Teil der Grundlagen bilden, werden diese Archaismen niemals herausgeworfen, sondern immer in allen Lehr- und Wörterbüchern zugleich mit den neuen Formen abgedruckt, und auf diese Weise haben wir die Sicherheit, dass selbst bei der kleinsten Perfektionierung die Einheit des Esperanto niemals zerbrochen wird und dass kein Esperanto-Werk selbst aus der frühesten Zeit irgendwann seinen Wert und seine Verständlichkeit für kommende Generationen verlieren wird [A 8.3].

#### **[Alineo 9: Monopolo de la Akademio plivastigi la Fundamenton – efektiva neceseco]**

*[9] Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektigadi [A 9.1]. Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]: a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco [A 9.3]; b) fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].*

#### **[Absatz 9: Monopol zur Erweiterung des Fundamento – effektive Notwendigkeit]**

[9] Ich habe im Grundsatz gezeigt, auf welche Art die strenge Unantastbarkeit des „Fundamento“ für immer die Einheit unserer Sprache bewahren wird, ohne dabei die Sprache zu hindern, nicht allein reicher zu werden, sondern sogar sich konstant zu vervollkommenen [A 9.1]. Aber in der Praxis müssen wir selbstverständlich (aus schon vielfach besprochenen Gründen) sehr vorsichtig mit jeder Art von „Vervollkommnung“ der Sprache sein [A 9.2]: a) wir dürfen das nicht

leichtsinnig machen, sondern nur in Fällen einer effektiven Notwendigkeit [A 9.3]; b) machen können das (nach reiflicher Überlegung) nicht einzelne Personen, sondern nur irgendeine zentrale Institution, die unangefochtene Autorität für die ganze Esperantistenschaft hat [A 9.4].

#### **[Alineo 10: Resumo]**

[10] *Mi finas do per la jenaj vortoj [A 10.1]:*

1. *pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo [A 10.2];*

2. *la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla [A 10.3];*

3. *ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [A 10.4].*

#### **[Absatz 10: Zusammenfassung]**

[10] Ich schließe daher mit folgenden Worten [A 10.1]:

1. für die Einheit unserer Angelegenheit muss jeder guter Esperantist vor allem gut die Grundlagen unserer Sprache kennen [A 10.2];

2. die Grundlagen unserer Sprache müssen für immer unantastbar bleiben [A 10.3];

3. bis zu dem Zeitpunkt, zu dem eine mit Autorität ausgestattete, zentrale Institution entscheiden wird, die bisherigen Grundlagen durch die Offizialisierung neuer Wörter oder Regeln zu vergrößern (niemals zu ändern!), muss alles Gute, das sich nicht im „Fundamento de Esperanto“ findet, nicht als verpflichtend, sondern nur als empfohlen angesehen werden [A 10.4]

#### **[Alineo 11: Propono al UK 1; la „ideoj“ de la Antaŭparolo]**

[11] *La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatan opinion [A 11.1]. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].*

*L. ZAMENHOF. [A 11.3].*

*Varsovio, Julio 1905. [A 11.4].*



**[Absatz 11: Vorschlag an den ersten Weltkongress; die „Ideen“ des Antaŭparolo]**

[11] Die Ideen, die ich oben zum Fundamento de Esperanto ausgeführt habe, stellen in der Zwischenzeit nur meine private Meinung dar [A 11.1]. Gesetzeskraft erlangen sie nur, falls sie vom ersten internationalen Kongress der Esperantisten angenommen werden, dem dieses Werk zusammen mit seinem Vorwort vorgelegt werden wird [A 11.2].

L. Zamenhof [A 11.3]

Warschau, Juli 1905. [A 11.4].